

PENSEO

N-ro 361

nov. / 2021

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 32-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

Wally du Temple (Kanado)



Korako, nigra Mesaĝisto de la Malpleno

Ĉu Korak', la fulga fluganto de la Malpleno
Ekaperas al vi, paŝe saltas kriĉe nigre?
El sferoj kie ĉio estas senforma peno
Estiĝi el spacspiraloj por vivi malpigre.

Ĉu Korak', nigra Mesaĝisto de la Malpleno
Provokas vin pri viaj internaj psikaj timoj,
Provokas vin pri memkreita demonda sceno.
Ĉu Korak', flugilfrape kulpigas vin pri
krimoj.

Serĉu por kuracilo en magio de Korak'.
Se leza la koraka magi', anoncu pri lim',
Fajrigu foliojn, petegu per fuma tabak',
Se bona, vi ofertu agloplumon pro estim'.

Se korakaro vorticas voĉbrue-suĉ-true
Malaperu per kaŝiĝo kiel vulpo frue.

Ángel Arquillos (Hispanio)



Pluvegas

Pluvegas,
kaj la domon mi ne vidas,
ĉar neniu min atendas,
Dio, kion mi pretendas?
Mi preĝas,
sed la ĉiel' min ne aŭdas,
ĉar mia voĉo mutiĝas

kaj la domon mi ne vidas.
Mi plendas,
ĉar neniu min atendas
kaj tra la pado senfina
mi kun timeg' piediras

marto 2020

PAROLI KUN VI DENOVE

Paroli kun vi denove,
eble jam ne havas sencon,
ĉar vi estas nur memoro...
Se mi aŭdus vian voĉon,
tute certe mi ekkrius
petante vian revenon,
sed via voĉo mutiĝis,
kiel la tagoj mutiĝas,
kiel kandeloj fandiĝas,
kiel la vivo finiĝas...

marto 2018

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Defio

"por ke ĝi ne komprenu per sia koro." (Jesaja, 6:10)

Blaise Pascal malkovris
ke la koro kialojn havas
kiun kialon mem ne scias.
Ĉi tiuj nekonataj kialoj
kantitaj kaj verse kaj proze
jen de Pessoa aŭ Drummond.

Kaj ĉu mi povas do demandi:
ĉu racio havas koron?

Kiel Jesaja nin instruis,

*kompreni per la koro;
jen mia sekreta aspiro.
Mankas sento al la racio
por provi ekkompreni
l' intiman naturon de Dio.*

Juiz de Fora, 13/10/2021


Rita Mkrtchyan (Armenio)



Al mia karega filino, kiu naskiĝis aŭtune kaj tre ŝatas aŭtunon, kaj al ĉies filinoj!

Mi preĝas Dion pri la ĝojo via,
Pri sano, verda voj', rilato varma,
Pri tio, ke pli ofte la rideto
Lumigu vizaĝon vian ĉarman.
Mi petas sunon radii vian vivon,
Apude nur amikoj bonaj estu,
Kaj ne vundigu koron ies agoj, vortoj,
La rev' alproksimiĝu kaj por ĉiam restu.
Mi petas aŭtunon pri la bunta festo,
Pri tio, ke forigu fortajn pluvojn, ventojn,
"Folio lasta" estu la komenco
Komenc' de renkontiĝ', de belaj sentoj.
Se iĝu vortoj— florbukedon,
La bondeziroj— la kolieron el la perloj,
En vesto de folioj oraj
Vi estu plej feliĉa kaj plej bela!

Jadranka Miric (Serbio)



Post infana semajno

Pasis infana semajn'.
Ĉiu feste donacojn disdividis.
Pluvo da promesoj por io ajn
kion ni aplaŭde akceptis!
Pasis sukcese konkursoj infanaj
Jam estis la bonegaj poemoj premiitaj
kaj la plej belaj desegnaĵoj elektitaj.
Restos memoroj kore neforgeseblaj!
Infanoj aplaŭdis ride
fiere riverenciĝis

al ni starantaj vid-al-vide.
Dece en bonetoso disiĝis.

Preĝo al Dipatrina

Mi, kore al vi, preĝas
surgenuiĝe mute ripetas
la sanktajn vortojn. Vin petas
ne nur dum matena spirita liturgio!
Protektu vi, granda Sinjorino
sian popolon pekan!
Al ĉiu pacon donu
por ke ni ne vivu en mallumo.
Estu forgesita malamo,
al ĉiu infano estu pano,
kaj senpaga edukado.
Al malsanulo estu flegado,
por ĉiu maljunulo dumviva zorgado!
Ke neniam ekestu milito
nur kresku amo, solidareco
kaj inter popoloj amikeco!

Ivanichka Magharova (Bulgario)



Trans la fenestro
la luno kaŝrigardas.
Ho, scivolemo.

Piednudaŭtun'
vento pelas foliojn.
Vintro ĉe l' sojlo.

Malvarmetiĝas!
La krizantemoj velkas.
Tekruĉo kantas.

Printempa pluvo
la peoniojn banas.
Brilas rosgutoj.

Sonplenigas korn'
arbaron. Mateniĝas!
Koncert' al birdoj.

Blankan marmoron
sunpenigas de luno.
Adiaŭ... kaj nom'.

Elena Popova (Bulgario)



Aŭtunaj okulsignoj

La vento pelas
la aŭtunon. Ĝi sternas
tapiŝon por ĝi.

Sekaj rubusoj.
Flugas araneaĵoj.
Spir' el plugejo.

Kamp' de kolĉikoj—
aŭtuna okulsigno.
La ĉiel' ploras.

Birda konsilo.
Pretiĝo por fora voj'.
Kod' aŭ saĝeco?

Pejzaĝ' unuka—
koloriĉec' sur la Ter'.
Aŭtuna spiro.

Aŭtuna orhara

Ekflugis birdaroj,
nudiĝis branĉaroj,
kovras mi la Teron
per mola foliaro.
Mi kuras nudpiede
sunbrilan lokon trovi
sub la sun' avara.
Kantas mi malgaje—
Mi, Aŭtun' orhara.



Mimoza Ahmeti



Aŭrora aprila tago

Aŭrora aprila tago,
Kiam la pensaj makuloj pri sinmortigo
En la lobo de mia cerbo aperis
Kvazaŭ la humidaĵoj sur la domegaj muroj,
Mi maljunulinon nigre vestita renkontis.
Tra la trotuaro malatenta ŝi alpaŝis
Je malgranda vizaĝo kiom kikeraj grajnoj.
Silkan kaptukon surmetis
Zorge al la frunto alĝustigis,
Palton bone ŝi alkroĉitis
Per du grandaj arĝentaj butonoj.
La ŝtrumpoj sur la malgrasiĝinta kruro
malfermiĝis,
La ŝuoj farbitaj ĝis la kalkanumo.
Mi haltis. Mi rigardis. Kien ĉi tiu maljunulo
ekirus?
Tiom malpeza kaj forirebla kvazaŭ hirundon
La kaptukajn bastojn la vento forprenis...

La laboristoj de Krasta

Ĝi haltos. Post iome haltos la urbobuso.
Malkovros la laboristojn de Krasta ĝiaj okuloj.
Senvestitajn, sekigitajn kvazaŭ lignokarbon,
silentajn ŝtonojn,
Solida akuzo, grupo en la stacio.
Haltos la urbobuso, ili ĝin surgrimpos.
Sed, ha, kiom terura ilia surgrimpo!
Tiu malsata rigardo, silenta.
Tiu blankeco kalkŝtona sur la silentaj vizaĝoj.
Kalkiĝintaj haroj, silentaj.
Je silenta faruno enspirado
Neniu libera sidloko por ili, neniu
Kaj kiam la urbobuso plenpenas kaj ne povas
halti:
Postlasas ĝi, ho, kia teruro, tiun solidan
akuzon de la kalkiĝintaj vizaĝoj,
Kiu kun malsataj okuloj, kun longa malsato

postsekvas.
 Krasta estas pli timiga ol la Infero
 Tiun nokton.

Ankoraŭ frue

Kion faros tiuj infanoj
 Kun la haroj- olio pro la nebanado,
 Tiu junularo kun la ŝirita fungo
 Lastan sur la pantalonoj?
 Kion diros tiuj vilaĝaj domoj
 Kun la etaj pordobuŝoj,
 De kie anstataŭ la parolo
 Ekaŭdigas hunda bojo?

Kion faros mia silueto
 En la pulvorujo de la flava vojo?
 Mia ribelema nervo
 Mortiĝas anstataŭ mortigi...

Elalbanigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

Guo Moruo (1892-1978)



Stratoj Sur la Ĉielo

Ekbrilas strataj lampoj en malproksimo,
 kvazaŭ steloj flagrus jen kun glimo.
 Sur la ĉielo ekaperas steloj,
 kvazaŭ strataj lamoj lumus kun sublino.

En imago mia, sur la ĉielo nebuloza
 ekzistus certe stratoj belaj.
 La varoj en bazaroj la ĉielaj
 certe montrus sian econ kurioza.

Rigardu, Lakta Vojo malprofunda
 aperas ne tre larĝa nek akvo-abunda.
 Bovpaŝtist' kaj Teksistino* disigita de l'
 Arĝenta Vojo
 frekventus ofte per bovrajd' kun granda ĝojo.

En tiu ĉi momento, kredas mi,
 ili vagus tra ĉielaj stratoj kun emoci'.
 Jen la falstelo brila tra la ĉiel-oceano,
 ĉu ĝi ne ŝajnas lantrno en ilia mano?

**Bovpaŝtisto kaj Teksistino estas figuroj en ĉina legendo. Ili enamiĝas unu la alian, sed ili ne povas kuniĝi pro la disigo de la Arĝenta Vojo (la Lakta Vojo). Ĉiujare la sepan de la sepa monato laŭ ĉina kalendaro ili havas ŝancon renkontiĝi per la ponto formita de pigoj.*

Kamelo

Vi — la ŝipo en dezerto,
 mont'vivanta!
 En mallumo,
 levas vi la kapon alten,
 gvidante vojaĝantojn
 al la horizonto de aŭroro.

En pluvŝtormo,
 vojaĝantoj
 apogante sin al vi
 travivas malfacilojn.
 Vi — nobla kreitaĵo de Naturo,
 vivo kaj konfido,
 neforgesebla varmo.

La printempa vent' oazon vekas,
 dolĉa fruktoj pendas sur dezertaj arboj,
 ĉie regas verdo herba kaj fontoj flujaj.
 Belaj songoj
 flugas kiel papilioj riĉkoloraj:
 senlima sabla tero
 fariĝis kamp' fekunda.

Jen fajrlumaj nuboj aras ĉe la horizonto.
 Longa Marŝo ne toleras
 la tagon kiam la marŝad' ĉesiĝos.
 Eĉ se ni atingus la ekstremon de l'
 terglobo,
 ankoraŭ ja troviĝus bona li lok' ekstere.

Vi, kamel' — raket' interplaneda,
 misil' vivanta!
 vi ekipas vojaĝantojn
 per kuraĝ' giganta.
 bonvole gvidu nin antaŭen
 por ĉiam, ĉiam.



elĉinigis **Eto (Ĉinio)**

El Ĉina Antikva Poezio

Li Qingzhao (1084-1151)

—*laŭ melodio Lanta sontreniĝo*

Mi serĉas, serĉas kion jam perdiĝis,
 en frido, en mallum' malplena.
 Mi sentas min mizera, forlasita
 kun koro afliktita kaj plenĝena.
 Ankoraŭ la restanta frid' persistas,
 malfacilas teni min bonfarta kaj sensplena.
 Du aŭ tri tasoĵ da alkoholaĵ' neniel povas
 rezisti kontraŭ l' vento rapid-vena.
 Sovaĝanseroj preterflugas suden, kiuj
 jam ne rekonas min en dolor' ĉagrena.

Velkintaj floroj amasiĝas sur la tero,
 magriĝas ankaŭ mi kun sent' korŝira.
 Kiu ankoraŭ emas pluki florojn
 kun bonhumor' dezira?
 Ĉe la fenestro mi pasigas tempon,
 ĝis noktalveno en atendo maltrankvila.
 Vespere pluvo batas la foliojn de platanoj,
 tiktake kontraŭ mia koro jam subtila.
 Kiel mi povus nomi tiun senton,
 krom afliktiĝo, la ĉagren' suspira?

—*laŭ melodio Budhista dancisto*

Vento milde blovas,

suno brilas pale,
 fru-printempo ĵusas.
 Mi min sentas joviale
 bonhumora kun maldika vesto.
 Post vekiĝo mi sentimentale
 jen ekhavas malvarmeton,
 l' umefloro interhare
 jam senvive velkis
 kaj ŝrumpiĝis ŝancel-stare.

Kie estas la hejmloko,
 ho, hejmloko mia kara?
 Nur ĝin mi forgesas,
 kiam mi senprepara
 ebriiĝas kiel maso.
 Incensfum' spirala
 dispeliĝas jam senspure,
 sed ankoraŭ la amara
 hejmsopiro dronas
 en alkoholaĵ' fatala.

—*laŭ melodio Kvazaŭsonĝe*

La ekskurs' al Fonto Xiting
 ofte venas al mi en memor':
 mi min distris tie ĝis vespero,
 forgesante pri l' revena hor'.
 Kiam mi veturis per boato,
 vojeraris mi kun stupor'
 ja profunden inter lotusfloroj.
 Mi barakte remis jen per penlabor',
 forte remis, akvaj birdoj sur sablbenko
 en paniko flugis al ĉielo sor.

—*laŭ melodio Plendo pri princino*

Sur la lag' karesas vento,
 ondoj sin rulas al la for'.
 Jam aŭtun' malfrua regas,
 ruĝo kaj aromo en ĉi-hor'
 raras aŭ forsvenas.
 Montoj kaj river' en brilkolor'
 plaĉas al okuloj kaj altiras
 homojn per pejzaĝa belo.
 Kiel nepriskribebbla la dekor'!

Jam maturas lotussemoj
 post velkiĝ' de lotusfoliaro.
 Matenrosoj pure lavis akvajn herbojn
 kaj lemnflorojn ja ĝis hela palo.
 Akvaj birdoj en dormado
 ne returnas kapon en ignora staro,
 kvazaŭ ili havus haton: kial homoj
 tiom frue hejmeniras antaŭ la sunfalo?

elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Jiang Shiquan (1725-1784)

Jarfine mi atingis hejmen

Plej ĝojas la patrino, kies amo
 senlimas, dum jarfine mi revenas.
 Vatveston mian vi stebadis dense,
 kaj l' hejmlerojn freŝaj ĝisnun tenas.
 Ĉe l' vido, vi bedaŭras mian magron,
 kaj pri l' vojaĝ' amare ja mienas.
 Nu, kiel via filo, mi rimorsas
 kaj muton pri ekstera pen' katenas.

Fan Yun (451 - 503)

Kurta restado en Xinting

Fore de l' rivero arboj ŝajne flosas;
 rande de l' ĉielo sola fumo rektas.
 La rivero kaj ĉielo kunfandiĝas;
 fumo kaj arbaro similaj aspektas.
 Nu, de kie fontas blua fluo vasta,
 kaj la velo alta kien sin direktas?

Li Gang (1083 - 1140)

Malsana bovo

Vi plugis kaj produktis multe da riz-greno,
 sed kiu vin domaĝas pri l' laciga peno?
 En vesperruĝo mi preferus morbe kuŝi,

se la popolo sin satigus sen problemo.

Xu Ji (1162 - 1214)

En friska mateno

Rizkampo akvoplena estas vasta kaj ebena,
 tra arbojn en krepuska nebulo la suno brilas.
 Ankaŭ al orioleoj plaĉas frisko frumatena,
 kaj ili en verdmonta ombro gajhumore trilas.



Huang Geng (?-?)*

Ankrite en Linping

Ankriĝas ĉe salika ombro pasaĝerboato,
 sur lago noktomeza friskas la aero flua.
 La luno diseriĝas en muara ondiĝado,
 kaj bonodoras lotusfloroj en zefiro ĝua.

**La poeto vivis dum la periodo de la Song-dinastio
 (1271-1368)*

elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-SESA

La eksteraj estaĵoj

§26-01

Oni povas trovi en la eksteraj aferoj

nenian certecon, kaj tial Guan Longfeng estis ekzekutita, Bigan estis kruele buĉita, Jizi estis devigita ŝajni sin freneza, Elai estis mortigita, la reĝo Jie kaj la reĝo Zhou estis renversitaj. Neniu monarko ne esperas, ke liaj ministroj estos lojalaj al li, sed la lojalaj ministroj ne ĉiam estas fidataj. Tiel Wu Zixu estis mortigitaj kaj lia kadavro estis ĵetita en la riveron Jangzi, kaj Chang Hong estis mortigita en la lando Shu, kie lia sango estis konservita tri jarojn kaj transformiĝis en verdan jadon. Neniuj gepatroj ne esperas, ke iliaj infanoj estos file sindonemaj al ili, sed la sindonemaj filoj ne ĉiam estas amataj. Tial Xiaoji mortis de malĝojego kaj Zeng Can suferis de afliktiĝoj dum la vivo.

La frotado de du lignopecoj faras fajron, kaj metalo enmetita longe en la fajro estas fandita. Kiam la jino kaj la jango estas en malharmonio, la ĉielo kaj la tero terure misfunkcias: tiam tondroj krakas, fulmoj brilegas kaj pluvego falas torente, tiel ke eĉ la grandaj soforoj estas bruldifektitaj. Iuj homoj estas obsedataj de malĝojego kaj zorgoj pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj, kiujn ili ne povas eskapi. Kaptitaj de paniko, ili povas plenumi nenion.

Ilia menso estas en profunda deprimiĝo, kvazaŭ pendante inter la ĉielo kaj la tero. La reciproka frotado de tio, kio estas avantaĝa, kaj tio, kio estas malavantaĝa, alportas al ili damaĝon, kiu detruas ilian internan harmonion. Ĉar ili ne povas konservi trankvilecon en la menso kaj la sinregadon, ili degeneros kaj perdos sian denaskan naturon.

§26-02

La familio de Zhuangzi estis malriĉa, kaj li iris pruntepreni de la rivervoja vokto grenon por vivteni la familion.

“Konsentite,” diris la rivervoja vokto. “Post kiam mi ricevos la imposton de mia feŭdo, mi pruntos al vi tri cent mezurojn da oro. Ĉu bone?”

Zhuangzi subite ŝanĝis sian vizaĝkoloron de kolero kaj diris:

“Hieraŭ, kiam mi estis survoje ĉi tien, iu min vokis. Mi rigardis malantaŭen kaj vidis karpon en la flako funde de radsulko. Mi ĝin demandis: ‘Eta karpo, kion vi tie faras?’ Ĝi respondis: ‘Mi estas sendito de la Orienta Maro. Ĉu vi bonvole savu min per sitelo da akvo?’ Mi diris: ‘Konsentite! Sed mi nun iras renkontiĝi kun la princoj de la regnoj Wu kaj Yue. Mi penos persvadi ilin, ke ili kondukigos la akvon de la Okcidenta Rivero ĉi tien, por vin savi. Ĉu bone?’

“La karpo subite ŝanĝis sian vizaĝkoloron de kolero kaj diris: ‘Mi jam perdis mian naturan vivmedion kaj ne estas en mia elemento. Mi bezonas nur sitelon da akvo por daŭrigi mian vivon. Se vi parolas al mi tiele, estus do preferinde, ke vi baldaŭ serĉus min en la bazaro de sekigitaj fiŝoj.’”

§26-03

La filo de la duko Ren sin provizis per grandega fiŝhoko kun dikega nigra fiŝfadeno kaj preparis kvindek grasajn bovojn kiel la logaĵon. Li kaŭris sur la monto Kuaiji kaj ĵetis la hokegon en la Orientan Maron. Tiele li kaptis neniun fiŝon dum la tuta jaro. Finfine kolosa fiŝego englutis la logaĵon kaj subite ĵetis sin profunden kun la hokego. Poste ĝi leviĝis supren kaj skuadis sian dorsan naĝilon. La ruliĝantaj ondegoj estis tiel altaj, kiel montoj, kaj la tremantaj akvoj estis ĉiam muĝantaj. La muĝado bruegis kiel tiu de la dioj kaj la demonoj, kaj disĵetis teruron malproksimen je mil lioj. Kaptinte la fiŝegon, la filo de la duko Ren tranĉigis ĝin en pecojn kaj sekigis ilin. De la orienta bordo de la rivero Zhe ĝis la norda piedo de la monto Cangwu troviĝis neniuj loĝantoj, kiu ne satmanĝus la viandon de tiu fiŝego. Ekde tiam scivoluloj en la postaj generacioj vaste rakontis tiun ĉi historion unu al alia kun granda miro.

El tio oni do povas konkludi, ke kiel

hokfîsisto kun sia eta stango kaj maldika fiŝfadeno apenaŭ povas kapti grandan fiŝon en la fosaĵo, tiel tiu, kiu nur kun siaj frivolaj paroloj apenaŭ povas ĉasi al si famon kaj profiton. Tial tiuj, kiuj neniam aŭdis la rakonton pri la filo de la duko Ren neniel povos bone regi la mondon.



Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Mandio (Ĉinio)

Aŭtuna vento

—laŭ ĉinesko Dekses-Silaboj*

Vent'
blovas el la okcident'
kun pluvo
de fridiga sent'.

Flu'
malvarma pikas sen bru'
ĝis ostoj
kun dolora sku'.

Pluv'
falas sur herbojn en tuf'
humide
kaj mian
veston kun kap-kuf'.

Roj'

pluvakva fluas kun ĝoj'
en kanal'
apud kota voj'.

Mont'
malklaras en nebulond'
for-fore
je la horizont'.

Vent'
aŭtuna mordas per dent'
la homojn
en frida turment'.

Ve,
ĝi vokas min super te'
kruele
al pens' pri pase'.

* *Dekses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa (x=senrima)*

Jadranka Miric (Serbio)

Ŝanĝoj ĉiam okazas

—laŭ inesko Sopir-al-sudo*
Sopiras
mi al Sudo. Ve .
Ĉe mi malvarmo daŭras.
Pluvas . Oni diras ke
revarmiĝos tre!

Sopiro
kreskis pli aj pli.
Ŝanĝa veter' rapide
kaŭzis klimatsanĝojn. Ni
malkvietas pli.

Vulkanoj
vekiĝis. Timo
regas inter loĝantar'.
Do, nek helpas ocimo
nek la landlimo.

Malgraŭ ĉio
ekzistas dezir'.
Aperas nostalgie
laŭ la memorvojo. Mir'
de granda sopir'.

Mi scias
ke karaj homoj
tie ne plu estas. Nur
natur' restas senŝanĝa!
Kiaj mensogoj!

Kaj miro okazas

—laŭ inesko Sopir-al-sudo*

Kvieta
nigra nokt'.Varma
ĉambro plenas de lumo.
Unu leter' el Parma!
Bonvenon ĉarma.

Amika
ĝojiga leter'
mildas tenere koron
pro la rara manier',
surprizas ci er'.

Amikec'
el tempo fora,
vivas inter homaro,
vigle agrablas. Ora
tempo.Tutkora!

Memoroj
dolĉaj vekigis.
Kiom da belaj surprizoj
kiam ni renkontigis.
Ĉu maljuniĝis?

Sennombraj
demandoj kreskis.
Duo en lernejskeĉo.
Ja, kamaradeca kis'
amon provokis.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)

Senplumuleto

Ŝi sidiĝis sur la benkon sub la prunarbo
kaj etendis siajn krurojn por ripozi. Nur la
florbedojn ŝi fosis, sed sentis sin laca.

— La vintro estis longa kaj mi eble tre
senmoviĝis. Sed la printempo jam regas — ŝi
direktis rigardon supren kaj alrigardis la
branĉojn de la arbo. — Nek pruno, nek
mirabelo — daŭrigis voĉe paroli Elena. — Ĝiaj
fruktoj estas pli bongustaj nematuriĝintaj ol
maturiĝintaj. La infanoj ŝatas konsumi ilin
nematuriĝintaj. Kiom aĝa estas la arbo neniu
povas diri. Ĉu ĝi estas plantita aŭ
memkreskinta sovaĝa ĉi tie, neniu scias — ŝi
respiris kaj direktis rigardon al la malnova
domo.

Ŝi trovis la arbon fruktodona kiam ŝi,
estiĝinte bofilino, venis en ĉi tiun domon. Kaj
kiom da jaroj pasis de tiam, probable pli ol
kvardek, kaj ĝi ankoraŭ naskas. Kaj nun ĝi
montris multan fruktodona. La viroj
senbranĉetigis ĝiajn branĉojn por rejunigi ĝin.
Tiel ŝia edzo klarigis la multjaran vivon de la
arbo.

Hodiaŭ ili venis de proksima urbeto, kien
ili translokiĝis kun Stojan, ŝia edzo, antaŭ jaroj
por perlabori la panon. Estis pli malfacile al ili
loĝi en la vilaĝo, ĉar tiam mankis laboro por
ĉiuj. Dum vivis liaj gepatroj, ili venis, sed pli
malofte. Ili iel sukcese plenumis sole siajn
taskojn. Sed post kiam la gepatroj mortis, la
zorgo pri la domo kaj la korto restis por ili.
Dum la somero ili pasigis plej grandan parton
de sia tempo ĉi tie. Ili semis tion kaj alion, por
helpi sian vivtenon. Kaj ĝi, la tero, estis
fekunda kaj dankema. Sed post kiam ŝia
dommastro perdiĝis, ŝi ne plu revenis tiel ofte.

Ŝia filo, Zdravko, prizorgis la bienon. De tempo al tempo li veturigis ŝin kun si. Kaj nun ŝi estis ĉi tie. Elena volis fari tion kaj alion, sed plejofte por vidi, ĉu la hirundoj denove nestis. Pli ol jardeko ili havis neston en la angulo, sub la tegmento de la malnova domo. Ili kreskigis sian idaron tie.

Kaj nun la paro de hirundoj estis ĉi tie. Ilia nesto — inĝeniera konstruado. Mirinde estas tio, kiu instruis ilin kiel fari siajn nestojn. Kiel laŭ fadeno — pinĉopreno da koteto ili metas, kaj poste pajlo por plifortigo.

Ŝi rigardis la neston. La malgrandaj kapetoj de la elkovitaj hirundoj estis jam videblaj. Ŝi provis kalkuli ilin, sed ili montris sin jen, kun la malfermitaj buŝoj, jen iliaj kapoj rapide kaŝis. Oni ne povis vidi ilian patrinon, la hirundon. Ŝi nepre iris por manĝaĵo, ĉar ne estas facile nutri grandan idaron.

- Unu, du, tri, ... Ili ree kaŝiĝis — provante ŝi ekscii kiom ili elkovis, sed malsukcesis. "Unu, du, tri, kvar ..." — ŝi nombris la malgrandajn kapojn, unu post la alia, kun malfermitaj beketoj, pretaj engluti la manĝaĵon, kiun alportis la hirundo. Ŝi ne povis fini la kalkulon ĉar denove ilia zorgema patrino furioze alflugis sur la neston. Dum ŝi provis kalkuli kiom ili estis denove, ili rapide kaŝis, glutante alian porcion da muŝoj. Ne multe da tempo pasis kaj jen hirundpatrino denove estis super la nesto. Ĉi-foje Elena sukcesis nombri la kapojn. Estis kvar kaj unu beketo.

"Kiel ĝi nutros tiom da gorĝoj?" — Ŝi diris laŭte, sed daŭre observis la neston.

Sed kio okazas! Ŝi miris pri la agado de la patrino-hirundo. La lasta hirundeto en la linio, kiu apenaŭ montris nur sian beketon ricevis nenian manĝaĵon. Ĝi restis kun buŝeto malfermita.

"Verŝajne ne sufiĉis nutraĵo por ĉiuj pro tio hirundpatrino ne plenigis la malfermitan buŝeton de la hirundeto. — Elena daŭrigis pensi voĉe. "Ĝi verŝajne estas la plej malaĝa, pro tio ĝi ne videblas el la nesto."

Sed tio, kion ŝi vidis la sekvan minuton, tre surprizis ŝin.

Per sia flugilo la hirundo energie eljetis unu el la hirundetoj sur la teron. Ĝi estis eta, preskaŭ nuda. Ĝi falis sur la molan teron, sed post kelkaj sekundoj levis la kapon, kvazaŭ por vidi, kie ĝi estas kaj de kie ĝi venis. La hirundpatrino per sia flugilo metis la aliajn en la neston kaj ekflugis por nova manĝaĵo. Surprizita, Elena ekstaris kaj rapide levis la falintan hirundon. La brusteto de la etulo montris, ke ĝi vivas. Ŝi haste prenis la ŝtuparon, supreniris kaj metis la tre malgrandan hirundeton inter la aliaj hirundetoj en la neston. Ŝi sidiĝis kaj ekatendis. Elena estis scivolema, kion faros la hirundpatrino. La hirundo verŝajne ne rimarkis, ke pretervole ŝi ĵetis sian idon sur la teron. Ŝi ne atendis longe. Jen la hirundpatrino denove aperis kun beko plena je bongusta manĝaĵo. Kaj ili, la hirundetoj, malferminte la bekojn, atendas. Ankaŭ kaj la tre malgranda.

Sed kio okazas? Denove la hirundo svingis sian flugilon kaj la malgranda troviĝis surtere.

"Ĉu ĝi ne estas kukolo?" — Elena pensis kaj iris rapide kaj reprenis la birdeton. La hirundo denove forflugis.

— Ne, ĝi ne estas kukolo! Ĝi estas ŝia ido, kaj ankoraŭ spiras! — voĉe diris Elena.

Ŝi remetis la etulon en la neston. Ŝi ne atendis longe. La hirundpatrino jen venis. Ŝi komencis enmeti la nutraĵon en la beketojn kaj ankoraŭ ne finiĝis la tagmanĝo, la etulo estis eljetita. Elena rapide levis la etulon kaj rapidege metis ĝin en sian antaŭtukon kaj premis al sia brusto. — "Eble la varmego povas revivigi ĝin," — ŝi ekpensis, sed skuis la kapon maltrankvile. Ŝi suspiris kaj komencis serĉi ŝovelilon por enterigi la hirundeton, por ke ĝi ne estu disŝirita de Miŝo, la kato. Ŝi maltrankviliĝis ĉar verŝajne Zdravko certe jam estis farinta sian laboron kaj vokos ŝin foriri. Sed ŝi ne faris paŝon kaj sentis ion movon en

sia antaŭtuko.

– Nu, karuleto ekvivis! – ekkriis feliĉe Elena. Ŝi prenis ĝin per siaj nodhavaj manoj kaj tiris ĝin pli proksime al la lipoj kvazaŭ kisante ĝin. – La ideto de avino, mia bebo!

La hirundeto, kiu sentis la varmon de ŝia vizaĝo, malfermis malgrandan beketon. La malsato ŝajne premis ĝin.

– Panjo, kio estas tio? – demandis Zdravko, preta forveturi.

— Hirundeto.

—Kial vi prenis ĝin el la nesto?

— Ne, ĝi ne estas en la nesto, ĝi estis sur la tero. Lia patrino forĵetis ĝin.

— Kial la hirundo forĵetis ĝin?

— Nu, ĉe la bestoj, filo, la leĝo pri natura selektado funkcias. Se idoj ne estas sufiĉe fortaj kaj ili ne postvivas, iliaj gepatroj forlasas ilin. Antaŭ jaroj, la sama paro elkondukis la etulojn instrui ilin flugi. Kaj tiam la idaro same estis kvin. Sed iu etulo ne povis ekflugi, ĝi provis, sed vane. La paro provis denove kaj denove helpante ĝin, sed malforteta ne povis teni sin per siaj malfortaj flugiloj. Ili ne sufiĉe kreskis. Kaj tiam paro forlasis ĝin, forflugis kune kun la aliaj.

— Kion vi faros kun ĝi? Ĝi ne vivos! Per kio vi nutros ĝin? Panjo, bonvolu ne zorgu tro multe! Lasu lin sola! Venu, ni foriras!

— Mi ne povas, filo! Koro ne permesas al mi! — Elena kaŝis la etulon en sia antaŭtuko kaj ekiris al la aŭto.

“Dio, vere, kion mi faru kun ĝi? Mi eĉ ne scias, per kio oni nutras malgrandajn hirundojn,” — ŝi konfesis, sed ekpremis ĝin al sia brusto kiel altvaloraĵon.

Kaj ŝi vere multe zorgis pri Senplumuleto, tiel Elena nomis ĝin. Unue ŝi komencis nutri ĝin per paneroj. Poste Elena trovis falaron, legis ie, ke tio estas bona birda manĝo. Kaj ĝi, la etulo, estis englutanta kaj atendanta pli. Ĝi komencis surplumiĝi. Nigra, brila plumaro kovris ĝian hirundkorpeton, kaj sur la brusto, blanka, tre ornamis ĝin. Senplumuleto

komencis petoli. La etulo ne sidis sur la branĉeto, kiun Elena portis, sed ĝi rapidis ekkoni la ĉambron. Senplumuleto ankaŭ klopodis etendi siajn flugilojn. Kiam Elena unuafoje vidis ĝin, ŝi estis ekstaza.

— Ĝi ekflugos! — ŝi diris tiel gaje, kvazaŭ ŝi estus flugonta.

La tagoj pasis kaj Senplumuleto montris karakteron. Ĝi venis al ŝia tablo kiam Elena manĝis, preta piki de la panujo. Ĝi tre ĝoigis Elena-n, do etulo estis ŝia kunulino dum siaj solecaj vesperoj. Sed lasi ĝin en kaĝo en sia domo, Elena eĉ ne pensis.

Iun tagon ŝi decidis meti ĝin sur la fenestran kornicon por vidi kiel ĝi reagos. Surprize por ŝi mem, ĝi ne timis. Ĝi rigardis kun scivolemo. Elena ĵetis al ĝi panerojn. La etulo rapide englutis ilin. Ŝi ripetis, sciante, ke tiutempe ŝiaj hirundoj venis por tagmanĝi. Ŝi atendis vidi, kiel ili akceptos Senplumuleto-n. Por ŝia plezuro, la renkonto estis amika. Kune ili ekbekis. La tagmanĝo finiĝis kaj la hirundoj forflugis. Ŝi denove enĉambrigis ĝin. Do Elena faris tion kelkajn tagojn. Kaj la Senplumuleto jam flugis de loko al loko. Ĝiaj flugiloj fortiĝis kaj la etulo flugis malpeze en la aero.

— Ĝi forflugos kun ili iun tagon, — Elena diris kun malĝoja voĉo.

Kaj tiu tago ne malfruiĝis. Estis tagmanĝo kiam la birdaro alflugis por sekvanta manĝaĵo. Ili frande glutis la panerojn kune kun ŝia Senplumuleto. La tagmanĝo rapide finiĝis. La birdoj etendis siajn flugilojn kaj ekflugis kune direkte al la bluo. Kaj nur Elena, kun mano levita por adiaŭo, staris apud la fenestro. Unu larmo ruliĝis sur ŝia vizaĝo.

Atsanig, la boreala aŭroro

Kiam aperas la boreala aŭroro, ĝiaj radioj dancas en la aero super la Norda poluso, kvazaŭ elfoj ĵonglus per fajraj buloj.

Inuita ĉasisto edzinigis la plej belan lokan virinon kun nigra haroj, ridetantaj okuloj kaj la vizaĝo de regulaj trajtoj. Ĉiuj aliaj virinoj en la vilaĝo ŝin enviis pro ŝia ĉarma vizaĝo.

Tamen malmultaj viroj enviis la ĉasiston, ĉar li kaj lia edzino ankoraŭ ne havis idojn post plurjara geedziĝo. Kiel seka ilia vivo devus esti !

Iun vesperon, kiam la ĉasisto revenis hejmen, kuŝante sur la neĝkovrita tero, li rigardis la noktualan faladon kaj trembriladon de steloj. Subite li vidis mirigan spektaklon: sur la malhela ĉielo trembrilantaj lumfaskoj desegnas misterajn formojn. Fojfoje fajropilkoj ŝajnis saltadis de fino de la ĉielo ĝis la alia, kaj je eklevo de sia mano li kvazaŭ povis tuŝi ilin. Li tre miris, sin demandante, ĉu tiu rava fenomeno estas bona aŭguro.

Tiun nokton, kiam li atingis la hejmon, li trovis la vizaĝon de sia edzino ĝojradianta. Ŝi diris al li , ŝi estis graveda kaj ke ilia plej granda deziro finfine realiĝos. La ĉasisto estis terure ĝoja, li pensis, ke tiuj strangaj lumoj elkondukis lin al feliĉo. Li rakontis al sia edzino, kion li vidis en la ĉielo, sed ŝi tute ne kredis tion, kion li diris. Ŝi pensis: dum momento li probable dormis, kaj ĉio ĉi tio estis nur sonĝo!

Kelkajn monatojn poste, ilia filo naskiĝis, kaj ili lin nomis Atsaniq.

Post pluraj jaroj, la infano fariĝis vigla junulo. En ĉasado de fokoj, li estis neniel malpli kompetenta ol lia patro.

Unu tagon, dum ili ambaŭ ekveturis en kajako sur la maro, la patro mortis pro akcidento. Tiam ili troviĝis sur la maro malproksime de la bordo, kiam leviĝis ŝtormo. Ili provis reveni al la glacio, sed la kajako de la patro renversiĝis. Antaŭ ol lia filo alrapidis por savi lin, li estis jam englutita de marakvo. Reveninte hejmen, Atsaniq sentis rimorson kaj penton pro tio, ke li ne povis savi sian patron.

Kiam li sciigis la teruran novaĵon al sia patrino, ŝi estis terure nekonsolebla. Ŝi banis sian vizaĝon la tutan tagon per larmoj,

priplorante sian edzon. Post nelonge ŝi ankaŭ forpasis.

Tiel Atsaniq fariĝis orfo. Kvankam li vivis sola , tamen li estis lerta ĉasisto. Li vivtenis sin per ĉas-metio, ne bezonante aliula helpon. Li terure sopiris al siaj gepatroj. Vespere sola en granda iglo, li ne povis elverŝi sian koron al aliaj kaj la soleco disŝiris sian koron.

En bela somera vespero, li eliris el la iglo kaj kuŝiĝis sur la teron por observi la stelojn, kiel lia patro faris tion antaŭ kelkaj jaroj. Subite li surprize vidis lumfaskojn leviĝi ĝis la ĉielo, kiel longaj haroj flirtis en vento.

De tempo al tempo fajraj pilkoj saltis de unu flanko al la alia de la ĉielo. Ĉe tio li rememoris la rakontadon de sia patro: la sama fenomeno okazis nelonge antaŭ lia naskiĝo. Nun li ankaŭ vidis tiujn strangajn lumfaskojn freneze dancantaj sur la steloplana ĉielo. Li ŝajne sentis alvokon, kiu lin altiris nerezisteble. Kelkfoje saltante alten en la aero, li etendis siajn manojn por provi tuŝi la lumfaskojn.

Li fantaziis, ke li komencis suprenleviĝi ĝis la ĉiela volbo kaj tie aliformiĝis kiel lumfasko ludanta kun fajraj pilkoj.



Ekde tiu tago, la nomo “Atsaniq” signifas “polusan lumon” en la inuita lingvo. Kiam oni vidas tiun mirindan spektaklon, ili ekpensis pri tiu orfo, kiu troviĝas feliĉa sur la eterna ĉielo. elfrancisigis el *LES HISTOIRES PHILOSOPHIQUES FRANÇAISES*



Lin Leming (Ĉinio)



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Retadreso: vejdo@163.com

www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm

